# ! Rezultoj trimestrofinaj en IZo !

En tiu chi jaro lerneja 2011-2012 Instituto Zamenhof (IZo) havas tri nivelojn en siaj instrulaboroj. Temas pri la antauelementa (porinfana) nivelo, la elementa nivelo kaj la meza. La elementa nivelo havas du sesiojn : la normalan sesion, kies kurso okazas tage, kaj la vesperan sesion por gepatroj de gelernantoj de IZo. La rezultoj de la fino de la trimestro koncernas tiujn kvar grupojn.

## ELEMENTA (UNUAGRADA) NIVELO

En la unua klaso estas 44 gelernantoj, el kiuj sukcesis 30 kun procentajho de 78,18 %. El la 41 gelernantoj de la dua klaso ekzamenighis 40 kaj chiuj sukcesis, kio estas 100 %. La tria klaso havas 56 gelernantojn, el kiuj sukcesis 39, kio estas 69,64 %. En la kvara klaso sukcesis chiuj 43 gelernantoj kun 100 %. La procentajho en la kvina klaso estas 86 %, kio montras, ke 43 gelernantoj el 50 sukcesis. En la sesa klaso estas 100 % da sukceso kun 37 gelernantoj. Kio nun pri la sesio vespera de la gepatroj de la gelernantoj.

Jes, estas gepatroj en la sesio vespera de la elementa nivelo. Ni vidu kion ili povis fari dum la ekzameno.
Tie chi estas malfermitaj du klasoj unuaj. De jaro al jaro aldonighos la aliaj klasoj ghis ses.
En la unua klaso estas 33 lernantinoj ( plenkreskulinoj). El ili ekzamenighis 24. El tiuj chi sukcesis 21, kio estas 91,66 % da sukceso, chu ne ? La procentajho en la dua klaso estas 100 % kun 15 gelernantoj-gepatroj (3 viroj kaj 12 virinoj).

## DUAGRADA NIVELO

En la unua klaso kun 60 gelernantoj ekzamenighis 59 kaj sukcesis 47 kun procentajho de 79,66 %. El 53 gelernantoj de la dua klaso ekzamenighis 52, kaj 33 sukcesis, kio estas 63,46 %. Chiuj 51 gelernantoj de la tria klaso ekzamenighis; 20 el sukcesis, kio estas 39,21 %. Nur 5 gelernantoj el 36 sukcesis en la kvara klaso, kio estas 13,88 %.

La instruistoj ne atendis ke oni demandu ilin pri la rezulto de la du lastaj klasoj. Ili povis jam ion diagnozi :"La nivelo de la gelernantoj en la franca lingvo estas malalta. Ili havas problemetojn ankau en fizikaj sciencoj kaj matematiko". Jam dum la ferioj de la fino de la unua trimestro estos helpkursoj. Tiaj kursoj okazos ankau en la dua trimestro ekster la normalaj kurshoroj.Pli intensa trejnado necesas, kio ne forgesigas la gelernantojn de la antau-elementa nivelo

## ANTAUELEMENTA NIVELO

Tie chi la infanoj estas en la stadio de observado. Ne jam okazis ekzameno. Kion ili bezonas, tio estas vekigho, kaj la instruistino kun sia gvidantino zorgas pri la infanoj. Certe che la fino de la dua trimestroj aperos listoj de gelernantoj, kiuj ekvekighas.